

Usona **Esperantisto**

Dumonata bulteno • Bimonthly bulletin Vol 48, N° 2 (2009/2)

Ĉu vi pretas por la Landa Kongreso en Sankta Luiso?

(Vidu informon pri nia honora gasto sur pĝ. 20)

Ankaŭ ĉi-numere: En la ĉielo • *Orfiŝeto*: novelo de Tim WESTOVER
el *Marvirinstrato* • Kandidatoj al estraro sin prezentas • Mesaĝo
de d-ro Boris KOLKER • Where *do* those “n”s go? • Hajkoj • kaj pli...

Usona Esperantisto

Dumonata bulteno • Bi-monthly bulletin

Redaktisto • Editor: Hoss FIROOZNIJA

Sendu kontribuojn al • Send contributions to:

- ✉ Usona Esperantisto, c/o Hoss Firooznia
CPU 271205, U. of Rochester
Rochester, NY 14627-1205, USA
- ✉ bulteno@esperanto-usa.org

Redaktofinio por la venonta numero • *Editorial deadline for the upcoming issue:*

la 25-a de Majo 2009

★★★

Ni bonvenigas kontribuojn aŭ en Esperanto aŭ en la angla lingvo. Bonvolu aldoni viajn plenan nomon, foton kaj (ret)poŝtadreson. Sendante fotojn, nepre informu nin pri la nomoj de la fotinto kaj fotito(j), la loko kaj la dato. Ni perpoŝte resendos materialojn nur se vi aldonis mem-adresitan, afrankitan koverton.

Oni rajtas reaperigi materialojn el la bulteno kondiĉe ke oni ĝuste indiku la fonton kaj sendu al la redakcio ekzempleron de la publikigita materialo. Opinioj esprimataj ĉi tie apartenas al la aŭtoroj, kaj ne nepre prezentas vidpunktojn de Esperanto-USA aŭ la redaktoro.

We welcome contributions in either English or Esperanto. Please include your full name, photo, and email and/or postal address. With photos please include the name of both photographer and subject(s), the location and the date. Materials will be returned by mail only if you have included a self-addressed, stamped envelope.

You may reprint content from this bulletin if you give credit and send us a copy of the reprinted material. Opinions expressed here are those of the authors and do not necessarily reflect the views of Esperanto-USA or the editor.

★★★

Centra Oficejo • Central Office of Esperanto-USA

- ✉ PO Box 1129, El Cerrito CA 94530 USA
- ☎ 510.653.0998; 2510.653.1468
- ✉ info@esperanto-usa.org
- http://esperanto-usa.org

Direktoro • Direktoro, CO: William B. HARRIS
Prezidanto • President: Philip G. DORCAS
Vicprezidanto • Vice President: Tim WESTOVER
Sekretario • Secretary: Julie SPICKLER
Kasisto • Treasurer: Anna BENNETT
Aliaj estraranoj • Other board members: Joel AMIS, Jenja AMIS, Trevor ANDREWS, Mar CARDENAS, D. Gary GRADY, Anjo HARLOW, Lusi HARMON, Ros HARUO, Christopher ZERVIC

Novaj rubrikoj baldaŭ venos!

Post apero de la lasta numero alvenis pluraj afablaj reagoj kaj konsiloj, aparte pri la ŝrumpigita formato. Mi ĝojas, ke la nova grandeco ŝajne plaĉas (aŭ, almenaŭ ne tro malplaĉas) al preskaŭ ĉiuj. Vilĉjo HARMON rimarkis, ke ĝi estas multe pli oportuna por legi dum oni manĝas. Tian utilon mi tute ne antaŭvidis, sed mi devas konsenti, ke Vilĉjo ja pravas. Estu singarda, tamen, ke vi ne verŝu supon sur la krucvort-enigmon; ĝi devas resti legebla por gajni premion!

Rilate al la krucvort-enigmo, kelkaj legantoj lastatempe demandis pri ĝi kaj pri la astronomia rubriko, ĉar mankis en ambaŭ aŭtorindiko. Pardonon pro la konfuzo; la verkinto estas via redaktoro. Kvankam mi ĉiam strebas atribui artikolojn al ties verkintoj, mi tamen emas preterlasi atribuan kiam la aŭtoro—aŭ eble ni diru, “kulpanto”—estas la redaktoro mem. (Nu, bona redaktoro devas resti kiel eble plej nevidebla, ĉu ne?)

Nu, ek al la ĉefa temo. En la venonta numero de *Usona Esperantisto* aperos kelkaj novaj rubrikoj, pri kiuj mi petas vian helpon:

- *Tradukaĵo-interŝanĝo.* Danke al propono de George BAKER, ni baldaŭ komencos projekton kun alilandaj gazetoj. Kunlaborantaj redakcioj sendos al ni mallongajn tradukaĵojn el siaj naciaj lingvoj en Esperanton; kompanse, ni resendos al ili niajn proprajn tradukojn el la (uson)angla. Tiel, ni ĉiuj ekscios pri novaj legindaĵoj kiujn ni alie ne renkontus. Do mi petas vin sendi viajn mallongajn tradukaĵojn—prefere el unike “usonecaj” tekstoj—por dividi kun niaj alilandaj amikoj.
- Danke al propono de Lee MILLER, ni enkondukos novan rubrikon *Demandu al Usona Esperantisto*. Ĉiunumere ni aperigos unu el viaj demandoj pri la lingvo, gramatiko, kulturo, literaturo, historio, ktp de Esperanto, kaj ĉiunumere mi trovos spertulon por respondi al ĝi. La unuan de-

mandon jam proponis Maya KENNEDY, kiu demandis pri la Novjorka Oficejo de UEA. Kion oni faras tie? “Por mi, kaj eble por aliaj legantoj,” skribis Maya, “ĝi estas mistero. Eble ĝi ricevus pli da subteno se usonaj esperantistoj komprenus ĝin pli bone.” Trafe dirite. Do, mi nun serĉas spertulon por klarigi la aferon. Ĉu vi povas helpi? Aŭ ĉu vi

eble havas demandon por la sekva numero? Kontaktu min!

- Finfine, ni baldaŭ inaŭguros serion de “facilaj” artikoloj, rakontoj, kaj enigmoj por helpi niajn komencantojn. Se vi havas proponojn tiurilate, nepre sciigu min.

Amike kaj redaktore via,
—Hoss FIROOZANIA

We need you! Your membership fees help promote Esperanto and provide services to speakers and students across the country. Members receive the bi-monthly newsletter, the *Membership List*, discounts from the Book Service, access to online resources (mailing lists, blog space, etc.) and a discount at the national convention. Please join (or renew) today!

Return this form with payment to: **Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito CA 94530**

Name: _____

Address: _____

City & State: _____

Postal code & Country: _____

Phone & Fax: _____

E-mail: _____

Birthdate (M/D/Y): ____/____/____ Ham radio call: _____

In the membership list, don't publish my: address phone fax email

Send me info on joining the *Universala Esperanto Asocio*

Check **one** category of membership/support:

- Life (*birthdate required*)..... \$800.00
- Sustaining..... \$80.00
- Family..... \$60.00
- Individual..... \$40.00
- Youth (*you must be under 27*)..... \$20.00
- Limited Income..... \$20.00
- Friend of Esperanto..... \$10.00

(*not a membership, but you receive 3 issues of the newsletter*)

Credit card info: Visa Mastercard

Number: _____ Expires(M/Y): ____/____

CO devas translokiĝi denove

Pasintjare la Centra Oficejo translokiĝis al Emeryville, Kalifornio, kie E-USA nun subluas oficejon en konstruaĵo luita de alia firmao. Pro la lastatempa ekonomia krizo, la firmao devos translokiĝi al alia urbo en Majo, kaj bedaŭrinde la nova luigonto ne volas sub-lui spacon al malgranda organizaĵo kiel E-USA.

Bonŝance, Vilĉjo HARMON kaj Direktoro Vilĉjo HARRIS jam trovas taŭgan lokon haveblan je bonega prezo en apuda konstruaĵo. La lu-prezo estos eĉ malpli ol la nuna, do finfine la kontraŭvola translokiĝo ŝparos al E-USA pli ol \$5000 jare. Laŭ la Direktoro, la nova loko “ne estas luksa, sed sufiĉe bona”, kaj “la translokiĝo espereble estos pli facila ol antaŭe, ĉar ĉio, kio ne estas ĉiutage uzata, restas en skatoloj.”

Vilĉjo HARMON rimarkas, ke poŝta servo en la nova konstruaĵo estas bona, la oficejo ne havas ĝenajn kolonojn aŭ internajn murojn, kaj malgraŭ tio, ke ĝi bezonas novan farbon kaj muntadon de librobretoj, efektive la translokiĝo estos bonŝanca afero: “Translokiĝo estas ĉiam bona ebleco por renovigi kaj plimodernigi. Mi tute fidus je Vilĉjo HARRIS pri tio.”

Tuttaga Esperanto-Kunveno en Norda Teksaso

Raportis Elizabeto DORCAS

La 7-an de Marto, 2009: estis bela tago ĉe la balkono. La milda brizo karesis nin kaj la birdoj kantis. La geamikoj sidis en cirklo kaj legis laŭte unu al la alia el la ĉarma libro *La Eta Princo*, de Antoine de SAINT-EXUPÉRY.

Ni babilis pri la belaj vortoj kaj profundaj pensoj de la Eta Princo. Ni helpis unu la alian kompreni novajn vortojn. Neniu deziris lasi la belan spacon en tempo, nek

lokon nek sperton. Finfine la subiranta suno venigis la vesperan malvarmecon, kaj ni eniris la domon.

La legado daŭris vespere ĉe varma salono. Aliaj amikoj kiuj ne parolas Esperante alvenis al la hejmo. Ni legis laŭte, kaj post ĉiu frazo ni tradukis por la novaj vizitantoj.

La tago komenciĝis je la 9-a matene kaj daŭris ĝis la 9-a ptn. Ni matenmanĝis, tagmanĝis kaj vespermanĝis kune. Ni ĝuis tempon en nia Esperanta librejo. La klubanoj elektis librojn kaj KD-ojn por pruntepreni.

Ni babilis inter ni pri multaj temoj. Unu temo estis, kiel nomi la diversajn enhavojn de la bongustaj manĝaĵoj! Aliaj temoj estis pri la Landa Kongreso ĉi-maje ĉe Sankta Luiso, kaj alia estis NASK (la Nord-Amerika Somera Kursaro). Ni babilis pri familianoj, laboroj, libroj, kaj aliaj temoj Esperante. Ĝuinda okazo!

Esperanto group joins international UU council

Reported by Ron Glossop

The newly formed international group “Unitarian Universalist Esperanto Network” (UUEEN) has just been accepted as an associate member of the International Council of Unitarians and Universalists (ICUU). Since Esperanto is the basis of an evolving planetary community of millions of people committed to the ideals of peace, justice, friendship, and acceptance of diversity, it is a natural fit with one of the seven purposes of the Unitarian-Universalist Association, “the goal of world community with peace, liberty, and justice for all.”



At the global level, American Esperantists believe that it is unfair to require Unitarian-Universalists who use different national languages to learn English when Esperanto exists as a democratic alternative. That is especially true in the case of an international religious organization which faces the prospect of trying to use more and more different national languages as it expands into more and more countries. For more information, see <<http://grupoamikema.org/UUEN.html>> and <<http://icuu.net>>.

A Taste of Esperanto in Washington State

Reported by Ellen Eddy

Camp Fire Adult Weekend takes place every year, the last weekend of February on Vashon Island at Camp Sealth (named for Chief Seattle, the head of the local Indian tribe in the mid-1800's). During the weekend, adults get to sample many crafts, activities, and subjects.



Ellen EDDY (with daughters Chris EDDY and Beth MORRIGAN) lights the Candle of Love at the Camp Fire meeting.

This year the theme was “Around the World in 36 Hours” and I was asked to teach a two-hour Esperanto mini-course. Later my students presented two Esperanto songs during the lunch hour and also took part in the inspirational meeting on Sunday morning. My daughter Beth and I took turns reading from a speech given by Chief Seattle in 1856 when he was asked by the US government to sell the land that the tribe called home. Beth read the English parts and I the Esperanto:

Message to the Modern World Mesaĝo al la moderna mondo

How can you buy or sell the sky—the warmth of the land? The idea is strange to us. Yet we do not own the freshness of the air or the sparkle of the water. How can you buy them from us?

Every part of this earth is sacred to my people. Every shining pine needle, every sandy shore, every mist in the dark woods, every clearing and humming insect is holy in the memory and experience of my people.



Kiel oni povas aĉeti aŭ vendi la ĉielon—la varmecon de la lando? Tio estas stranga ideo por ni! Ni ja posedas nek la freŝecon de la aero nek la trembrilon de la akvo. Kiel vi povas aĉeti ilin de ni?

Ĉiu parto de tiu grundo estas sankta por miaj tribanoj, ĉiu brilanta pinglo de pino, ĉiu sabla bordo de lago, ĉiu nebuleto en la malhelaj arbaroj, ĉiu saltetanta kaj zumanta insekto estas sankta por la memoro kaj la vivsperto de miaj tribanoj.

This was a fitting message since the camp sits in the midst of 400 wooded acres abutting Puget Sound. Not only did the class members get a taste of Esperanto, but so did approximately 100 other participants. ★

En la ĉielo



Ĉi-jare la Unuiĝintaj Nacioj kaj aliaj internaciaj asocioj festas la Internacian Jaron de Astronomio. En ĉi tiu rubriko por 2009, ni traktas diversajn astronomiajn aktualaĵojn aperantajn en la ĉielo de la norda duonsfero. Por ke ĉiuj povu partopreni, ni strebos trakti ĉefe aferojn videblajn per nur nuda okulo aŭ simpla binoklo.

Dum Februaro kaj Marto la hele impona Venuso glitis pli kaj pli malsupren en la vespera ĉielo, finfine malaperante en la sunan brilon. En frua Aprilo Venuso reaperis kiel frumatena astro, videbla en la orienta ĉielo ĵus antaŭ sunleviĝo. Aparte bela vidindaĵo prezentos sin **la 21-an de Majo frumatene**, kiam la preterpasanta luno renkontiĝos kun Venuso kaj la malhela Marso; la triopo formas kompaktan triangulon ĵus super la orienta horizonto (vidu bildon malsupre).

Vespere kaj nokte, nun regas la flav-oranĝa Saturno alte en la suda ĉielo, ĵus sub la konstelacio Leono. Ĝi ne brilas tiel hele kiel brilis Venuso en Februaro, sed serĉante kun iom da pacienco, oni povas trovi ĝin relative facile.



frumatene, la 21-an de Majo
unu horon antaŭ sunleviĝo



Kiel distingi planedon disde aliaj astroj sen helpo de teleskopo? Foje eblas rimarki diferencon eĉ per la nuda okulo, observante *trembrilon*.

Malsimile al steloj, planedoj preskaŭ neniam trembrilas. Kial? Ĉiuj steloj (krom la suno) estas tiel treege malproksimaj, ke ili aperas kiel nur punktoj sur la ĉielo. Atingante nin, la lumradio de stelo estas tiel mallarĝa, ke ĝin facile tordadas nia malkvieta atmosfero. Tial steloj kutime ŝajnas flagreti.

Kontraste, la planedoj estas multege pli proksimaj. Ankaŭ ili aspektas preskaŭ punktecaj, tamen iliaj lumradioj estas multe pli larĝaj ol tiuj de la steloj, kaj tial preskaŭ tute mankas al ili trembrilo. Do, se vi iam scivolos, ĉu iu astro estas stelo aŭ planedo, rigardu ĝin atente: ĉu ĝi trembrilas same kiel aliaj astroj, aŭ ne?

Ankaŭ nia luno povas helpi nin trovi planedojn, kiam ĝi foje agas kiel montrilo. Samkiel nia Tero, la orbitoj de la aliaj planedoj ĉiuj situas en proksimume la sama ebena. Tial, vagante tra nia ĉielo, ili ĉiam troviĝas en mallarĝa zono, kiun astronomoj nomas *ekliptiko*. Ankaŭ la luno moviĝas tra la ekliptiko, kaj tial ĝi foje troviĝas apud planedo. Se la ĉielo estas sufiĉe sennuba ĉe vi **la 3-an de Majo vespere**, serĉu la lunon kaj vi eble trovos Saturnon (vidu bildon supre).

Bedaŭrinde, oni bezonas teleskopon por vidi la okulfrapajn ringojn de Saturno; binoklo ne sufiĉas. Tamen eĉ por tiuj, kiuj havas teleskopojn, la ringoj de Saturno strange malaperos ĉi-jare. Pri tiu mistera sed regula fenomeno aparte interesiĝis Galileo GALILEI, kiu antaŭ 400 jaroj estis eble la unua homo vidi Saturnon pere de teleskopo. Sed la unua mistero por li estis la eksterordinara aspekto de la planedo. Tiutempe oni supozis, ke Saturno estas perfekta sfero. Sed per sia simpla teleskopo, Galileo ekvidis strangan triopon. En la jaro 1610 li skribis:


“Saturno ne estas unuopa stelo, kiel la aliaj planedoj, sed tri kune, preskaŭ tuŝantaj unu la alian, sed inter si tute senmovaj en la formo oOo, tiel ke la mezo estas multe pli granda ol la flankoj, kiuj situas okcidente kaj oriente laŭ rekta linio.”

Sufiĉe strange. Sed nur du jarojn poste, en 1612, la misteraj flankaj astroj malaperis! Kaj kelkajn jarojn poste ili jam reaperis, ŝanĝante la formon de la planedo denove; Galileo skizis ĝin tiel:


Skizo de Saturno fare de Galileo GALILEI en la jaro 1616.



Bedaŭrinde por Galileo, la mistere ŝanĝanta aspekto de Saturno restis mistero dum lia vivo. Sed en 1655, helpe de pli kapablaj teleskopoj, astronomo Christiaan HUYGENS faris pli-malpli pravan teorion pri ĝi. Li hipotezis, ke ĉirkaŭas Saturnon plata kaj maldika ringo, iomete kliniĝanta for de la ekliptiko:



Ĉar la relativaj pozicioj de Tero kaj Saturno ŝanĝiĝas dum ties rondiroj ĉirkaŭ la suno, HUYGENS konstatis ke la ringo foje “malaperas” kiam ni vidas ĝin laŭebene.




La supozita ringo ĉirkaŭ Saturno (maldekstre, malsupre) kaj skizo klariganta la malaperon kaj reaparon de tiu ringo (supre).

El *Systema Saturnium* de HUYGENS, 1659.

Poste okazis longa debato pri la konsisto de la ringo, kiun multaj opiniis solida. Nur en la 19-a jarcento oni finfine konstatis, ke temas ne pri unu ringo sed efektive multaj ringoj, konsistantaj el svarmoj de etaj, apartaj satelitoj.

En la 20-a jarcento la famaj usonaj esploriloj *Voyager* kaj *Pioneer* vojaĝis al Saturno por observi la planedon detale, resendante majestajn fotojn de la ringoj kaj satelitoj. Kaj komence de la 21-a jarcento alvenis la multnacia orbitilo *Cassini*, kies nomo omaĝas la faman astronomon Giovanni Domenico CASSINI, malkovrinto en la 19-a jarcento de satelitoj ĉirkaŭ Saturno kaj granda breĉo inter la ringoj. Eĉ hodiaŭ la orbitilo *Cassini* daŭre ĉirkaŭiras Saturnon, sendante al Tero valorajn



Fotoj de Saturno fare de la kosmoteleskopo *Hubble*

NASA

datumojn pri la atmosfero de la planedo, ties magnetosfero, geologio, satelitoj, ktp.

En Decembro de 2004 la orbitilo lanĉis sian etan sondilon *Huygens*, kiu sukcese kaj mirakle surteriĝis (aŭ pli precize, surluniĝis) sur Titanon, kiu estas la plej granda satelito de Saturno. Titano estas aparte interesa al sciencistoj pro siaj likvaj lagoj, aktivaj vulkanoj, kaj densa nitrogenriĉa atmosfero—kiu eble similas al la praa atmosfero de Tero. Amasego da informo pri la ekspedicio de la esplorilo Cassini-Huygens troveblas surrete en NASA-retejo (bedaŭrinde nur anglalingva) ĉe:

<http://saturn.jpl.nasa.gov>

Postskribo: Lastatempe oni demandis pri la fonto de ĉielomapoĵ ĉi tie. Mi kreas ilin per libera (kaj vere bonega) programaro *Stellarium*, poste aldonante permane kelkajn detalojn kaj nomojn en Esperanto. *Stellarium* haveblas senpage por Vindozo, Makintoŝo kaj Linukso, kaj ĝi povas montri ĝuste kiel aspektus la ĉielo de ajna vidpunkto je ajna dato. Tre utile! Oni jam enesperantigis la interfacon kaj retpaĝaron, sed ankoraŭ mankas nomoj en ĝi por steloj kaj planedoj; eble niaj karaj legantoj povus helpi tiurilate. Vizitu:

<http://stellarium.org/eo>



Senkultura homo estas sklava besto (Cicero) ISSN 0299-6987

LA GAZETO

**MONDKULTURA
SENDEPENDA
ESPERANTISMA**

Petu provnumeron ĉe : LA GAZETO
12 sous la Ville, 55210 CREUË (Francio)

gazeto@aol.com http://www.lagazeto.com

(Ko)respondon deziras

**Simmon Keith BARNEY, 1111 Pacific St #407,
Vancouver BC, V6E 3X7, CANADA**

Mi studas animacion ĉe *Vancouver Film School* kaj mia revo estas fari animaciajn filmojn en Esperanto. Se vi subtenas mian revon, bonvolu sendi poŝtkarton al mi; mi volas montri al miaj samklasanoj, ke ja ekzistas homoj kiuj volas vidi novajn animaciaĵojn en Esperanto. Dankon!



**Paul CÉSAR, <paolocesarwz@yahoo.com.br>
Skajp-adreso: paolocesarwz1**

Brazilano serĉas Esperantistojn en Usono kiuj uzas la programaron Skajpo (angle, *Skype*) kaj volas konversacii kun li en Esperanto kaj la angla lingvo.

<http://esperanto-plus.ru/koresponda-servo>

Ekfunkciis nova internacia esperantista koresponda servo kun la nomo "Koresponda Servo Universala, KSU" fare de Viktor KUDRJAVCEV, redaktoro de la revuo *Komencanto*.

**Japana Esperanto-Korespondo-Servo,
KLEG, Sonehigasi 1-11-46-204, Toyonaka,
JP-561-0802, JAPAN**

Por tiuj, kiuj volas havi leter-amikojn en Japanujo. Sendu leteron aŭ poŝtkarton kun viaj nomo, adreso, aĝo, sekso, okupo, intereso, ktp. Nia servo nepre sendos konfirman karton al vi.

Jen la ĉi-jaraj kandidatoj al la estraro de Esperanto-USA. Iliaj nomoj aperos en balotilo, kiun membroj baldaŭ ricevos perpoŝte de la Centra Oficejo (CO). La CO akceptos la balotilojn ĝis la 20-a de Majo. Vi rajtos anstataŭe kunporti vian balotilon al la Landa Kongreso, kie la Direktoro akceptos ĝin ĝis la komenco de la vespera programo sabaton, la 23-an.

Julie WINBERG, M.Ed.



Dum pli ol 30 jaroj, mi estis Esperantisto, ĉefe en la internacia mondo: mi ĉeestis amason da Universalaj Kongresoj, servis kiel prezidantino de la Virino-Komisiono de

UEA dum kvar jaroj, prezentis prelegon pri vojaĝantaj sinjorinoj en la 19-a jarcento dum la 1979-a kongreso en Lucerno, publikigis artikolojn pri tiu temo en la revuo *Esperanto* en 1977, 1978 kaj 1979. Tiam mi loĝis en Filadelfio kie mi estis UEA delegito. Mi ankaŭ estris lokan grupon, kiu renkontiĝis ĉe mia domo. En 1986 mi translokiĝis al Italujo, kie mi restis ĝis 1996 kaj denove en la internacia Esperanto-mondo, ĉeestis UK-ojn, kaj gastis esperantistojn ĉe mia hejmo. Profesie mi instruis la anglan lingvon, kaj en Pisa laboris ĉe kolegio kie mi instruis tradukadon inter la itala kaj angla lingvoj.

Mi revenis al mia hejms Stato, Massachusetts, en 1996. Je tiu punkto, pro longa vivo ekster Usono, mi devis rekrei mian profesion vivon, kaj ĉe la Universitato de Massachusetts, gajnis magistran diplomon pri edukado: precipe Angla kiel Dua Lingvo (ESL) en 2000. Mi ĉeestis la landan kongreson ĉe MIT, visitis NASK-on dum ĝi estis surloke en Brattleboro, VT, kaj ankaŭ sukcesis partopreni Universalajn Kongresojn, i.a. en Svedujo kaj Italujo. La nova

profesio kiel instruistino forprenis la plejmulton de mia tempo, sed nun mi esperas turni min denove al Esperanto, ĉi-foje sur nacia kampo. Kaj pro tio, mi proponas min kiel estraron de Esperanto-USA.

Orlando E. RAOLA



Naskiĝis en Havano (1955). Doktoro pri Kemio (UC Santa Barbara, 2005) kaj profesoro pri kemio ĉe Santa Rosa Junior College. Esperantisto ekde 1984. Ekaktivis en la kuba movado kaj dum kvar jaroj laboris profesie por Esperanto. Ankaŭ agadis

internacie: LKKano kaj preleganto por la 75-a UK, preleganto en la Internacia Kongresa Universitato de la 88-a UK (Goteburgo). Ekloĝis en Usono en 1994, kaj tuj ekaktivis en la loka (San-Franciska golfo), kalifornia kaj tutlanda movadoj. Prezidanto de LKK por la 47-a Kongreso de ELNA, San-Francisko (1997). Estrarano de ELNA 1988-2007. Mi planas okupiĝi en la nova estraro pri servoj al la membroj de E-USA per Esperanto, pri utiligo de Esperanto por internaciaj kontaktoj, pri plintensigo de la internacia agado de la asocio. La 85-a UK okazos en Havano en 2010 kaj mi esperas, ke ni povos kunmeti la plej multnombran delegitaron de usonanoj al UK ekster Usono por veturi al Havano. Mi volas laboregi tiucele.

Tor KINLOK



Bakalaŭro pri komputiko; 1990; Universitato de Bostono. Eklernis Esperanton ĉe la Universitato de Hartfordo; 1996. Studis ĉe NASK en 1999 kaj 2000, denove studos tie en 2009. Helpis

sukcese propagandi al Usona Kongreso la kreadon de la usona orkolora unu-dolara monero.

Kiam mi estis etulo kaj mi eksciis pri la ekzisto de Esperanto, mirigis min la ideo de konstruita lingvo kaj la ideo de internacia kaj neŭtrala lingvo. Tra mia vivo, kiam mi parolas al homoj pri la ekzisto de Esperanto, kaj ĝia celo, ĉiam ili estas kaptita de la ideo kaj ĉiam surprizas ilin ke ili neniam aŭdis pri ĝi antaŭe.

Ofte mi havis la saman demandon.

Sendepende ĉu Esperanto gravas al la publiko; sendepende ĉu la celo de Esperanto gravas al oni, decas ke oni almenaŭ ekscii pri la lingvo. Kaj ke oni devas ekkoni al Esperanto-USA. Mi volas ke:

- Rektaj, celaj leteroj estu senditaj al homoj kiuj estas ekster la movado.
- Ofte okazu gazetaraj komunikoj de Esperanto-USA pri nunaj aferoj kaj eventoj.
- Esperanto-USA elektu opiniojn pri aktualaj lingvo-rilataj politikaferoj kaj uzu ilin kiel ilon por ekpliki kaj popularigi la esperantan lingvon.
- Esperantaj reklamoj okazu en ĵurnaloj, televid-programoj, kaj aliaj komunikiloj; kun la kontakta informo de Esperanto-USA.
- Estu kunordigado de publikaj rilatoj.

- Ofte E-USA petu al mecenatoj (per poŝto, telefono, kaj retroŝto) por gajni monon.

Esperanto devas havi vastan ĉeeston kaj devas fariĝi amasekonata. La antaŭaj punktoj estas esence unuaj manipuloj por okazigi tiun ŝanĝon.

En ĉi-tiu momento, socio estas ĉe gravega historia punkto, multaj grandaj ŝanĝoj okazas kaj la estonteco realiĝas. NASA laboras por starigi konstantan ĉeeston sur la Luno. Ekzistas klopodoj por krei solan, mondan formon de mono. La homaro ŝanĝas al puraj fontoj de energio por sanigi la vivmedion. Baldaŭ, aŭtoj replenigos sin per elektropova ŝtopilingo de via hejmo kaj rapidtrajno estos la preferata metodo por veturi.

Ĉi tiam estas la tempo por popularigi Esperanton al la homaro kaj al la populara kulturo; kaj nun estas la tempo por ke la lingvo ekprenu gvidan rolon. Mi volas labori al tia celo kaj mi petas ke vi subtenu min.

Jacob SCHWARTZ



Mi estis estrarano de Esperanto-USA (tiutempe ELNA) en 2002–2005, kaj ĉeforganizanto de la landa kongreso en Bostono en 2003. Mi reprezentis

USEJ-n en TEJO-kunsidoj ĉe la IJK en 2001 kaj 2003. Mi partoprenis kelkajn aliajn internaciajn kongresojn kaj seminariojn, inkluzive de la Tut-Amerika Kongreso (TAKE) en 2001 kaj 2008. Mi vojaĝis per Pasporta Servo en Japanio kaj Svedio. Mi diplomiĝis de universitato en 1999 kaj

laboras en Bostono kiel komputila inĝeniero.

Kiel estrarano, mi subtenos la pluan profesiigon kaj aktiviigon de Esperanto-USA. Mi opinias ke ni devas kopii la sukcesojn de aliaj ne-profitcelaj organizaĵoj. Ekzemple, vi eble rimarkas ke, kiam organizaĵo sendas leteron al vi, ĝi mencias siajn konkretajn agojn kiujn via mono subtenos. Esperanto-USA devas ade agi, ĉar ĉiu faro estas oportuni por “fanfaroni kaj publiki”, kiel esprimis Steve BREWER. Tiel eblas ankaŭ partoprenigi la membraron; ne necesas esti estrarano por kontribui al projekto de la organizaĵo. Ankaŭ servoj ĉe nia retejo (esperanto-usa.org) tiel helpas, do mi daŭre subtenos pliboniĝojn tie. ★

Forpasoj

Mubarak AMAR

En Februaro venis al la redakcio novaĵo pri la morto de pastro Mubarak AMAR en Decembro. Pastro AMAR dum jaroj estris la organizon “Amerika Katolika Esperanto-Societo”. (*Koran dankon al Peggy DOLTER pro la sciigo.*)

Martha EVANS

Life member Martha Evans passed away on March 4th at the age of 90. Her daughter Amber Benson writes: “Martha was a scientist, a musician, an artist, a writer, a linguist, a teacher, a creative spirit, a woman with strong passions and opinions, and tenderly in love with the world. [...] She lived her life to the fullest, and will be sorely missed.”

Hajkoj

en somera herbej'
rustimunaj ŝtalmusoj
brilaj ter-steloj

somerbruna herb'
ŝiras nebulfluon
ni kunvenas ĉe krest'

en somerkampo
beroj kaj ruĝaj lipoj
flustras amon

Venas printempo
sen vi. Ho por vidi vin
lastaŭtune.

silentas morne
dum flustre paŝas amo
sur mont' dormanta

la land' mansvingas
ĝise al pasanta viv'
grilo kantas plu

ŝtorm' fulmas nokte
frida mur' konvenas nun
en karcerinsul'

eŭkaliptodor'
antikva reĝ' kvietas
en juna urbo

hundeto skrapas
ĝoje ĉiudirekten
krom siaflaken

idon prenas kat'
frue el malalta nest'
kroma viv' atend's

ĝi vekas malfrue
post meznokta drinkado
ĉi unua sonĝ'

strabrigardante
helianto riproĉas
ĉu mi vekigu?

jam al fino
de tro mallonga jaro
foliblovilo

friska groto
tondra ondado
mi estas kun ci

—George BAKER

Where *do* those “n”s go?

In issue 2008/5 of *Usona Esperantisto*, Gary GRADY presented an excellent way of looking at verb transitivity—it’s all in the meaning, or definition, of the verb. I’d like to suggest an unusual but useful viewpoint for a related issue that students often find problematic: where to place the accusative *-n* in a sentence.

In English we usually use the term “direct object” for accusative, but that term is a poor fit for the use of the *-n* ending in Esperanto. A complete description of its functions using grammatical terms would be lengthy, complicated, and undoubtedly discouraging to most students. Fortunately, for most purposes it’s unnecessary. There is another simpler way to look at it: fundamentally, the *-n* means “not subject.”

A single clause (*propozicio* in Esperanto) has only one predicate. (Although it may consist of more than one verb, the verbs all function together on, and from, the same subjects and objects.) Every noun (or word that functions like a noun, such as pronoun or *rilativo* which connects a subordinate clause) in a single clause must be a subject unless it has a “tag” that indicates otherwise.

There can be a compound subject; i.e., more than one subject linked by a conjunctive connector word such as *kaj*. For example, *Kuko kaj glaciaĵo gustas bone*.

There are three kinds of “not subject” tags:

1. The simplest tag is the *-n* ending, which may mean “direct object.” But it is also used for many other grammatical functions which most of us don’t even learn about in English.

- a. *Kato vidas muson.*
- b. *Katon vidas muso.*



Joel BROZOVSKY

Esperanto was his primary language for two decades abroad and for the five years that he worked as Director of the Central Office. Joel now lives in Spokane.

betulo@mac.com

3. Preposition: any noun that is the object of a preposition cannot be a subject.

- a. *en skatolo*
- b. *por la lernejo*
- c. *pro maldiligento*

4. A connector verb that in some way equates two (or more) nouns. The most common verb for this is “is” (*esti*), but any verb that can indicate a state or change of state can function this way. For example, equal (*egali*), remain (*resti*), become (*iĝi* or *fariĝi*), make (*igi*, *fari*, *elekti*, and many others). If the verb indicates that something is, in some way, equal to something else, then ordinarily both of them do not need any other tag to indicate that they are not the subject, therefore an *-n* ending is normally not used.

- a. *Ŝi estas forta knabino.*
- b. *[Malgraŭ la akcidento,] li restas policisto.*
- c. *[Per muelado,] greno iĝas faruno.*
- d. *[Per fuŝa kuirado,] mi igis ĝin kaĉo.*
- e. *Oni elektis lin prezidanto.*

The latter two examples are worthy of some special consideration, because in each case, one of the two nouns being equated does have the *-n* ending. A verb that means “to cause something to be or become something else” tends to form a

more complex clause that can be confusing. In example (d) above, *Mi igis ĝin (la farunon) kaĉo*, means I made it (the flour) [into] mush, so the flour, or in this sentence “it” (*ĝin*), is equated with mush. However, “it” (*ĝin*) is the direct object of the main clause, so it needs the *-n*. It serves double duty in the sentence. Example (e) presents the same situation: in *Oni elektis lin prezidanto* (They elected him president), he is the one chosen—the direct object of the verb “elected”—but he is also the one they made into president by that choice, so the verb is equating him with president.

There is another situation similarly confusing with some compound sentences where the connecting word seems to play a double role in the two clauses. For example, *Ne preteratentu, kio estas antaŭ via nazo*. The connector word *kio* seems to be the direct object of the primary clause (what you shouldn’t overlook), yet here it does not use the *-n* ending. Why not? The answer is found in the key word “seems”—in fact, this is a case of leaving out part of the sentence that is nevertheless understood. The complete sentence would be *Ne preteratentu tion, kio estas antaŭ via nazo*. The real object of the primary clause is often left out, but to clearly understand the sentence, it is useful to mentally put it back in. Just remember that the connector word itself (*rilativo*, usually a *ki*-word) cannot be left out.

In NPV there is a note that one should not leave out the pronoun referred to by the connector word if it is not in the same case as the connector word. (In my example, the word *tion* should not be left out of the sentence, because the connector word *kio* doesn’t have the *-n* that *tion* has.) This is very good advice, as it would eliminate the confusion that arises in cases like my example. Unfortunately, in practice many people don’t follow that advice, so it is useful to understand this form even if

one heeds the advice and doesn’t use it.

This method is a very useful way to check something that you just wrote. Read through it again, looking at every word that functions like a noun to see if it has a not-subject tag. Make sure that you don’t have more subjects than you intend in each clause, and that each clause has a subject—the right one.

That is most of what you need to know about using *-n*. Two more points come to mind:

There is a common-sense rule that forbids using *-n* for more than one grammatical function in the same clause (except for indicating direction of movement in a prepositional phrase).

1. Not good: ~~*Mi instruas mian fratino*~~
esperanton.
2. Good: *Mi instruas mian fratino pri esperanto.*
3. Good: *Mi instruas al mia fratino esperanto.*
4. Even better: *Mi instruas al multaj amikoj de mia fratino esperanto!*

There is still the use to indicate direction toward the object of a positional preposition (but **not** with a directional one such as *al* or *el*).

1. *Kato iras en la necesojn.*
2. *Kato kuras al sia manĝejo.*
3. *Birdo flugas inter la kurtenoj kaj la fenestron.*
4. *Birdo flugas el la kaĝo sur mian kapon.*
(Without the *-n* endings here it would mean that the cage is on my head.)

Finally, it is necessary to remember that adjectives must agree with the nouns they modify with regard to case and plurality (i.e., if the noun has endings *-j* and/or *-n*, its modifying adjectives must also have them.) ★

Orfiŝeto kaj la Glacia Monto

Poste, Orfiŝeto sekvis la rivereton ĝis la riverego, kaj la riverego fluis tra dezerta loko. Strange, pensis Orfiŝeto, ke apud la akvofluo ne kreskas arboj aŭ arbustoj. Ĝi levis la kapon en la aeron kaj tuj konstatis la kialon. Varmegaj ventoj el la okcidento pikis la haŭton de kompatinda Orfiŝeto.

Proksimiĝis al la riverbordo barbulo, kiu trenis kamelon per bridilo. Liaj barbo kaj haroj estis longaj kaj blankaj. Sur la kamelo pendis hakilo, mantelo, kaj pajlofarĉita skatolo. La barbulo genuis por trinki. Orfiŝeto, pro sia kutima scivolemo, ennaĝis en liajn manojn, kiam li trempis ilin en la akvon.

“Sinjoro”, petis Orfiŝeto, “kial vi portas hakilon en tiu ĉi senarba loko?”

“Por la glacio, Orfiŝeto”, respondis la barbulo.

“Kaj sinjoro, kial vi kunportas mantelon en tiu ĉi varmega dezerto?”


“Pro la malvarmaj orientaj ventoj”, respondis la barbulo.

“Kaj sinjoro, kial vi kunportas pajlofarĉitan skatolon?”

“Por konservi la glacieron”, respondis la barbulo. “Sed mi jam fordonis ĝin, kaj mi ekiras denove al la nordo. La reĝo ĉiam bezonas glacieron.”

Orfiŝeto jam vidis sufiĉe de la mondo por kompreni, kia reĝo ĉiam bezonas glacieron. Kruela reĝo en ruĝa silko sidas sur ora trono. Ventumas lin sklavo; alportas vinberojn al li sklavinoj. Lukse li vivas; mizere vivas lia popolo. Orfiŝeto memoris la vortojn de la saĝa baleno antaŭ sia fi-ro: “Vivi avide kaj avare estas la celo de la homa koro.” Jes, Orfiŝeto vidis multajn kruelaĵojn dum siaj aventuroj. Orfiŝeto koleriĝis en sia blua koro, sed ĝi ne povis fari malbonon al homo, nur bonon. Ĉar

La jena fabelo aperas en *Marvirinstrato*, nova novelaro de Tim WESTOVER. La tekston de la libro oni rajtas nun libere elŝuti ĉe la retadreso sube, kaj la libro mem eldoniĝos paperforme ekde malfrua Majo. Koran dankon al Tim pro tiu ĉi frua ekvido!



<http://marvirinstrato.com>

koloro estas senutila, Orfiŝeto cedis la koron denove al scivolemo.

“Mi volas vidi la nordon kaj vidi, de kie venas tiu glacio. Se vi kunportos min, mi plenumos unu peton vian per mia ĉielarka vosto.”

Dirite, konsentite! Kaj la barbulo metis Orfiŝeton en tason plenan je riverakvo. Longe ili iris kune kun la kamelo, sekvante la riveron al fordistanca havenurbo. “Kial vi ne uzas boaton por iri laŭ la rivero?” demandis Orfiŝeton.

“Estas timigaj monstroj en la rivero, se oni kredas je monstroj. Kaj se ne, estas akvofaloj kaj kataraktoj, kiuj faras la riveron nenavigebla.”

“Neniam en la vivo mi vidis monstron en la akvo”, diris Orfiŝeto, “sed pri akvofaloj kaj kataraktoj mi bone konscias.” Kaj pri kruelaj reĝoj, aldonis la Orfiŝeto en sia koro.

Fine la barbulo kaj Orfiŝeto atingis la havenurbon. Tie staris granda nigra ŝipo kun kvar mastoj. Maristoj kuris laŭ la ŝipostanoj kiel formikoj sur mielo. “Saluton, kapitano!” diris la maristoj al la barbulo.

“Saluton, Orfiŝeto! Ĉu vi velos kun ni al la poluso?”

“Jes”, diris Orfiŝeto, kaj la maristoj komencis kanti.

“La nia estas bona ŝipo, kaj la viroj en ĝi bonaj homoj”, diris la barbulo. “Dek fojojn jam ni velis al la poluso por la glacio de nia reĝo; dek fojojn ni revenis.”

“Dek unu estas malfeliĉa cifero!” kantis la maristoj. “Ĝi signifas avidon kaj troplenon. Sed kun Orfiŝeto inter ni, ni certe revenos hejmen!”

Orfiŝeto zorgis pri la maristoj, ĉar ĝi volis nur bonon por homoj. Sed la kruela reĝo sendis ilin al danĝera vojaĝo; la kruela reĝo en sia tuta koro ne havis tiom da kompato, kiom la malgranda Orfiŝeto.

La maristoj levis la blankajn velojn, kaj la ŝipo ekiris al la blua horizonto. Multajn monatojn ĝi velis. Fojfoje minacis la ŝipon ŝtormaj ventoj; fojfoje minacis pacaj tagoj, kiam ne blovis eĉ la plej eta spiro de mevo. Tiuj tagoj estis teruraj, kaj la amikaj maristoj fariĝis koleremaj, komencis vetludi, eĉ preparolis ribelon kontraŭ la barbulo. Sed ribelo ne blovas venton, diris la barbulo. Denove la ventoj ekblovis, kaj ondon post ondo oni alproksimiĝis al la poluso.

“Jen la glacio!” diris maristo en la plej alta masto. La ŝipo daŭrigis norden, kaj la maristoj brajlis la velojn. Pordetoj en la flankoj de la ŝipo malfermiĝis, kaj la maristoj trempis grandajn remilojn en la maron.

“Ĉu vi prenos nun la glacieron?” demandis Orfiŝeto.

“Ĉi tie ĝi estas duonfandita”, diris la barbulo. “Ĝi ne restos solida tra la dezerto. Ni devos iri pli norden.” La barbulo surmetis la mantelon.

Ju pli norden velis la ŝipo, des pli dika fariĝis la glacio, ĝis la ŝipo ne povis plu veturi per la fortoj de la remiloj. La maristoj elsaltis la ŝipon kaj prenis ĉenojn ligitajn

al ĝia pruo. “Kaj, ek! Kaj, ek! Kaj, ek!” la barbulo kriis – dum “kaj” la maristoj pretiĝis, kaj dum “ek” ili tiregis la ĉenojn, kaj la ŝipo rampis antaŭen. La maristoj ŝvitegus, sed la malvarmaj orientaj ventoj glaciigis ĉiun ŝvitguton sur la brovo.

“Strange”, diris Orfiŝeto, “ke homoj nun veturigas ŝipon!” La maristoj ridis de malantaŭ frostokovritaj lipharoj.

Dum tri tagoj la maristoj tiel veturigis la ŝipon. Finfine la barbulo ordonis, ke oni faru bivakaron, ĉar la glacio estis solida plato, kaj oni estis sufiĉe proksime al la glacia monto. La maristoj per siaj talentoj ekflamigis fajron en bareloj sur la glacio. Ili varmigis siajn fingrojn kaj rostis fiŝojn kaptitajn el truoj fositaj en la glacio.

“Ĉu ĝenas vin, Orfiŝeto, ke ni manĝas viajn kuzojn?” demandis la maristoj.

“Ne ĝenas min”, diris Orfiŝeto, “ĉar la fiŝoj nur volas fari al vi bonon.”

En la distanco oni vidis ion, kiu similis al granda nuboj tuŝanta la teron.

“Jen la glacia monto, Orfiŝeto”, diris la barbulo. La monton la vento skulptis dum jaroj da konstanta blovo. Ĝi estis ronda kaj glata kaj polurita – krom la cikatro, de kie la barbulo kun siaj maristoj elprenis glacieron por la reĝo. Orfiŝeto bedaŭris, ke oni devas vundi la monton por elpreni la glacieron. Per la hakilo la barbulo eltranĉis grandan pecon kaj montris ĝin al Orfiŝeto. Ĝi estis dika kaj forta, jen blublua jen kristalklara, kiel la okuloj de bonkora servistino. Princina glacio, reĝa glacio.

“Ĉu ne bele?” diris la barbulo, kaj Orfiŝeto konsentis.

Ĉiuj maristoj prenis hakilojn, kaj dum semajno ili plenigis la ŝipon per glacio. La granda holdo, iam plenplene je biskvitoj kaj rumo kaj oranĝoj, estis nun plenplena je glacio. Inter la ŝipŝelo kaj la glacio la maristoj metis tavolon de pajlo, por kon-

servi la malvarmecon. Al Orfiŝeto tiaj laboroj estis preskaŭ nekompreneblaj – ĝi apenaŭ povis memori la varmegon de la dezerto.

Sian holdon plenan je kara kargo, la ŝipo ekiris suden, unue per homa forto, poste per remiloj, poste per vento. Kiam la veloj pufiĝis pro milda blovo, la maristoj ekkantis. Sunradioj varmigis fingrojn kaj nazojn.

Belaj tagoj tamen cedis al teruraj. Ŝtormoj taŭzis la kompatindan ŝipon. “Orfiŝeto, ni timas!” diris la maristoj, sed ili estis kuraĝaj dum la ondoj bategis. La maro bolis kaj muĝis. En la ondoj Orfiŝeto vidis ion, kiu devas esti monstro, ĉar en la maro ne estas akvofaloj aŭ kataraktoj. Ĉiuj timis, sed Orfiŝeto ne povis helpi per sia ĉielarka vosto. Ĝia ĉielarka

vosto estis promesita al la barbulo, kiu prenis Orfiŝeton al la rivero. Sed la barbulo restis en la holdo, kie la glacio malrapide ŝrumpis. Tagon kaj nokton, ŝtormoj minacis sed pelis la ŝipon hejmen.

Fine griza strio aperis ĉe la horizonto – la pontoj kaj standardoj kaj lumoj de havena urbo. La ŝipo alkajiĝis, sed la barbulo ne atendis por revena festo. Li metis la glacian sur longan platan veturilon. Knabetoj volis tuŝi la glacian, kaj knabinoj provis kapti pecetojn inter siaj maldikaj fingroj, sed la barbulo forbatis la fingrojn per branĉeto. Ne estis eble defendi kontraŭ ĉiuj forrabo, kaj la glacio ŝrumpis. La barbulo kovris la glacian per ruĝa silko kaj tavoloj de tolo kaj pajlo.

Ĉevaloj tiris la veturilon el la havena urbejo laŭ la ĉefa vojo. Homoj kaj bestoj kuradis ambaŭdirekte, tirante sakojn kaj

barelojn kaj kestojn kaj vagonojn. Tian frenezon Orfiŝeto vidis nur en la plej fortaj oceanaj fluoj, kiam salikokoj, moruoj kaj polpoj migras por manĝado aŭ naskado.

“Kien iras ĉiuj ĉi?” demandis Orfiŝeto el sia taso.


“Ne gravas”, diris la barbulo. “Ĉiuj konas sian propran destinon.”

Sed ĉiuj konis ankaŭ la valoron de la glacio sub la ruĝa silko. La glitado de la veturilo kaj susuro de ruĝa silko estis kiel tintado de oraj moneroj. La oreloj de saĝvi-zaĝaj marĉandistoj pintiĝis kiam la veturilo preterpasis. Orfiŝeto memoris la vortojn de la saĝa baleno: “Vivi avida kaj avare estas la celo de la homa koro.” Sed la plej avida, jes, estas tiu kruela reĝo, kiu for-

sendis la barbulon kaj liajn maristojn al la fora nordo, al danĝero kaj aventuro!

Oni veturis senĉese ĝis la ĉefa vojo fariĝis kota pado, kaj ĝis la kota pado fariĝis sabla nenio. La barbulo atingis la randon de la dezerto, kaj ĉe la lasta haltejo antaŭ la sabla maro li interŝanĝis la ĉevalojn kaj veturilon por kamelo kaj granda sako. En la sakon la barbulo metis la restantan parton de la glacio, kiu estis ne pli granda, ol peco da pano. Kaj la glacio daŭre ŝrumpis.

Nun la barbulo kaj Orfiŝeto vojaĝis tage kaj nokte. En la tagoj la akra suno estis minaco por ĉiuj – barbulo, Orfiŝeto kaj glacio. Ili benis la noktojn malgraŭ la malvarmego. La luno brilis blue kaj faris el la dezerto frostan pejzaĝon. Orfiŝeto pensis, ke ĝi vidas denove la glacian monton. Tamen, ne: tio estis la kurba tegmento de la reĝa palaco. Jen, ringitaj de domoj kaj ven-



dejoj kaj kadukaj grizaj ejoj, la blankmarmora reĝa palaco.

Ĉe la pordego la barbulo forlasis sian kamelon. Restis nur peceto de glacio, nur tiel granda, kiel pugno. Heroldoj renkontis la barbulon kaj per trumpetoj anoncis la alvenon. Soldatoj kun kurbaj glavoj certigis, ke la stratoj al la palaco estis senobstaklaj. De malantaŭ brilantaj klingoj, ĉifuloj rigardis la glacian kaj ties posedanto kun avido kaj ĵaluzo.

“Orfiŝeto, kia beno! Glacio, kiom pli!” diradis la ĉifuloj.

La pordegoj de la palaco large malfermiĝis, kaj la barbulo kaj Orfiŝeto eniris la grandan halon. Granitaj statuoj de la antikvaj herooj kaŝis siajn vizaĝojn malantaŭ ŝtonaj kaskoj. “Kredeble ili konkeris monstrojn”, pensis Orfiŝeto, “sed mi dubas, ĉu ili konkeris akvofalojn aŭ kataraktojn. Aŭ la glacian monton.” Dancistinoj aperis kaj malaperis. Ankaŭ ili kaŝis siajn vizaĝojn, sed per buntaj toloj, ne per malvarma ŝtono.

La lasta pordo estis malfermita por malkovri armeon de korteganoj kaj eĉ du elefantojn, kies dentegoj estis kovritaj per ruĝa silko. Sed oni apenaŭ atentis la bestegojn. Korteganoj kaj soldatoj kaj dancistinoj kaj la barbulo kaj Orfiŝeto klinis sin antaŭ la ora reĝo sur la ora trono. Lia barbo estis rivero de lumo, kaj lia hararo estis arbaro de cinamo. Li ridegis, kaj ĉiu sentis lian ridadon en siaj piedoj.

“Saluton, Orfiŝeto!” diris la reĝo. “Vian rakonton mi volonte aŭdos poste. Sed mankas al ni tempo.”

Al la reĝo la barbulo solene donis la glacian, kiu estis nur tiel granda, kiel Orfiŝeto mem.

La reĝo stariĝis kaj per grandaj paŝoj kuris el la palaco. Kune kun ĉiuj siaj kort-

eganoj kaj ornamitaj elefantoj, dancistinoj kun buntaj vualoj, kaj soldatoj kun brilantaj klingoj, la reĝo eniris la labirinton de mallarĝaj kaj malhelaj aleoj de la urbo, zigzagante kvazaŭ hazarde. Orfiŝeto ne sciis, ĉu la reĝo sekvis iun signifoplenan vojon aŭ elektis laŭ la kapricoj de sia koro.

La reĝo haltis antaŭ pordo, kiu estis identa al cent aliaj, kiujn oni jam preterpasis. Ene mezaĝulo prilaboris botojn. Al li la reĝo etendis sian manon. La botisto formetis sian martelon kaj prenis la glacian, kiu finfine ne estis pli granda, ol butono. Ĝin li metis en sian buŝon kaj fermis la okulojn, frandante.

“Dum sia tuta vivo, la reĝo neniam gustumis glacian”, diris la barbulo al Orfiŝeto. “La plej grandan trezoron oni ŝparas por ordinario.”

“Kaj kion oni faros poste? Ĉu festo?” demandis Orfiŝeto.

“Kia festo povus egali la aferon?” diris la barbulo. Jam la reĝo estis for, kaj nur la dancistinoj pro siaj buntaj vualoj estis videblaj inter la grizaj homamasoj.

“Reportu min al la rivero”, diris Orfiŝeto el sia taso al la barbulo, “ĉar jam mi vidis pli, ol mi povas kompreni.”

La barbulo reportis Orfiŝeton al la bordo kaj metis la tason en la akvon, por ke Orfiŝeto facile elnaĝu. “Mi dankas pro la afabla akompano”, diris la barbulo.

“Mi dankas pro la vojaĝo al la glacia monto”, diris Orfiŝeto. “Kaj nun mi memoras mian promeson. Mi plenumos unu deziron vian per mia ĉielarka vosto. Diru, kaj mi faros.”

La barbulo profunde klinis sin, ĝis siaj lipoj preskaŭ tuŝis la riveron.


“Mi volas esti tiu, kiu ricevas la glacian.” ★

krucvort-enigma

Kiel kutime, ni lotumos unu premion inter la solvintoj: \$10 da rabato ĉe la libroservo de Esperanto-USA. Ĉiuj membroj rajtas partopreni. **Via solvo alvenu al la redakcio (aŭ poŝte aŭ rete) antaŭ la 31-a de Majo.** Bonan solvadan!

Horizontale

- | | | | | | | | |
|----|---|----|--|----|-------------------------------------|----|--|
| 1 | Vojon al trezor' ĝi povas montri | 32 | Longa unupeca vest' | 38 | Danĝera submara rok', foje korala | 51 | Malplena spac' |
| 4 | Somera renkontiĝo, kiun gastigas lernu.net (ml.l.) | 33 | Rusa imperiestro | 39 | Longa voĉa esprim' | 52 | Horo kiam ofte komenciĝas gimnaziaj klasoj, kun "la" |
| 7 | Malgranda | 34 | Moda stil' de muziko | 43 | Konformas al kutimoj kaj moroj | 53 | "Ne kredu al ___o, kredu al okulo." |
| 10 | Preni kaj konservi teniĝon por esti fotata | 35 | Rigardos filmojn elsendatajn per elektromagnetaj ondoj | 47 | Kontrakt' por ricevi gazeton | 54 | Kapapogil'? |
| 11 | Oktobra renkontiĝo nuntempe en Silver Bay, NY (ml.l.) | 37 | "Najbaro ne ĝemas, kiam ___o nin premas." | 48 | "Mastro en vojo—servantoj en ___o." | 55 | Numer' 53, ĥemie |
| 12 | Izole | | | 50 | Tia, kia George Soros, ekzemple | 56 | ι (greka liter') |
| 14 | Ŝia kaj ŝia | | | | | | |
| 15 | Senvola kuntir' de muskoloj, ofte en vizaĝo | | | | | | |
| 16 | * Gent', klan' | | | | | | |
| 17 | Plej malaltranga ŝakpeco | | | | | | |
| 19 | * Urbopart' | | | | | | |
| 21 | Profesia sufikso | | | | | | |
| 23 | Kaŭzi | | | | | | |
| 24 | Maltrankviligi; faligi per bona scio? | | | | | | |
| 28 | "Trafi du celojn ___ unu ŝtono." | | | | | | |
| 31 | Piedoprem' | | | | | | |



Vertikale

- | | | | |
|---|---|---|--|
| 1 Cedante, knedeble, en maniero de vakso | 7 * Regi | 25 "Temp' estas valoro simile al ____" | 36 "Unu ____o taŭgas pli ol dek aŭdoj." |
| 2 Mondoparto kie okazis la Universala Kongreso en 2007 | 8 Rondforma kuk' kun tavolo de flano aŭ kuirita frukto | 26 Filofil' | 37 * Virta hom' |
| 3 Profesi' de LIBERACE kaj BORGE | 9 "Unu floras, ____ ploras." | 27 Part' de teatraĵo ludata fare de aktoro | 39 Bird' kun multaj "okuloj" |
| 4 Asocio kiu eldonas PIV-on (mll.) | 10 Fumil', ofte kurba | 28 Kampara voj' | 40 Praa komputil'? |
| 5 Arbustospeci' kun rozkoloraj floroj, ofte trovita en sabla tero | 13 Eventuala okaz' | 29 Unu el multaj konsistigaj pecetoj | 41 * Muzikstilo de la <i>Rolling Stones</i> |
| 6 * Frukt' en manĝaĵo ŝatata de piedvagantoj | 18 Malmola korpoptart' en vertebruloj | 30 Akvovapor' kiu dumnokte fluidiĝas sur herbon | 42 * Kromnomo de David K. JORDAN; ejo por elakvigi ŝipon |
| | 20 Eksterigi kapablon | 33 Ili kaŝiĝas en la solvoj markitaj per steletoj | 44 Ŝmiraĵo neutila por ŝuo farita el (35 vertikale) |
| | 22 Partoj de konstruaĵoj atingebaj sen ŝtoparo aŭ lifto | 35 Teksaĵ' el lino | 45 Permona akir' |
| | 24 <i>Et cetera</i> , al Cicerono (mll.) | | 46 Natria klorid' |
| | | | 49 Verda gem' |

Kvankam la ruza po-signo en nia lasta enigmo momente pensigis kelkajn partoprenantojn, post iom da cerbumado ili tamen sukcesis. "Komence, la helikoj konfuzis min", skribis Kevin HAULK. "Mi pensis, 'estas preseraro.'" Sed feliĉe li solvis la enigmon tute ĝuste.

Gratulon al vi, Kevin, kaj ankaŭ al George BAKER, Brian Neil BURG, Randy DEAN, Ellen EDDY, Vilĉjo HARMON, Arlyn KERR, E. James LIEBERMAN, Peter MCCORQUODALE, Mark RAINEY, Dave RUTAN kaj Russ WILLIAMS.

Apartan gratulon al Keneĉjo GOLDBERGO, kiu ĉi-foje gajnis la premion. Li skribis, "volas mi elekti @r vi bele @luritan @mon!" Nu, tio ne necesas, kara Keneĉjo, sed dankon al vi pro la afabla per@ŝta res@ndo...

Solvo de la krucvort-enigmo el numero 2009/1

1	M	E	S		4	@	T	E	N	C		9	B	O	T
1	A	D	E		1	@	R	C	I	O		10	U	N	U
15	J	U	B	I	14	L	E	O		14	L	A	B	O	R
					1	D	O	N		20	Ĝ	O	J		
3	P	L	U	E	2	I	R	I		2	L	A	T	O	
3	S	I	R	O	3	@		U	N	I		3	B	U	L
3	A	B	I		3	V	E	T	O	S		3	O	L	E
3	L	A	N		4	O	N	I		4	T	A	L	I	O
4	M	N	O	P	4	U	N	G		4	R	I	@	J	
					4	I	L	I		5	L	U	D		
5	T	R	O	V	5			P	O	S	I	G	N	O	
5	I	S	M		6	@	L	U	R	O		6	U	E	A
6	@	ŝ	O		6	J	A	P	A	N		6	T	E	Z

Honora gasto ĉe la 57-a Landa Kongreso de Esperanto-USA: D-ro Boris KOLKER

Ĉi-jare nia honora gasto kaj preleganto estos d-ro Boris KOLKER, membro de la Akademio de Esperanto, kunredaktoro de *Monato* kaj aŭtoro de la vaste konata kaj ŝatata libro *Vojaĝo en Esperanto-Lando*.

Biografieto: Naskiĝis en 1939 en Tiraspolo, Moldavio (Sovetunio); transloĝiĝis en 1993 al Klevlando, Ohio. Doktorigiĝis pri lingvoscienco, defendinta disertacion pri esperantologia temo. Aŭtoro de tri Esperanto-lernolibroj, interlingvistikaj artikoloj kaj recenzoj. Gvidanto de la Internacia Perfektiga Koresponda Kurso (IPKK). Kunfondinto kaj kungvidanto de SEJM (Sovetia Esperantista Junulara Movado), ASE (Asocio de Sovetiaj Esperantistoj), SEU (Sovetrespublikara Esperantista Unio), REU (Rusia Esperantista Unio), komitatano de TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo), komitatano kaj ĉefdelegito de UEA, kaj kunfondinto de EVA (Esperantlingva Verkista Asocio). Vicprezidanto de la Internacia Ekzamena Komisiono (IEK) de ILEI/UEA. Instruis Esperanton ĉe usonaj universitatoj en San-Francisko kaj Hartford.

La redakcio petis d-ron KOLKER doni al ni etan antaŭguston de sia prelego. Li afable respondis:

“Grandegaj ŝanĝoj en la monda situacio (fino de la malvarma milito, malfermiĝo de landlimoj) kaj en la scienc-teknika progreso (Interreto, videotekniko kaj aliaj)

draste ŝanĝis vivkondiĉojn por Esperanto. Esperanto fariĝis pli videbla, pli facile lernebla kaj uzebla. Ŝanĝiĝis motivoj por lernado de Esperanto kaj restado en Esperantujo. Kreskas kvanto de esperantistoj, sed samtempe malkreskas membronombro en Esperanto-organizaĵoj.”

“En mia prelego *Modernaj rimedoj por reteni homojn en Esperantujo* dum la 57-a Landa Kongreso de Esperanto-USA, mi klopodos prezenti la panoramon de novaj kondiĉoj, kion ni poste pridiskutu por ellabori kaj firmigi novajn vojojn por la progreso de Esperanto. Ĉies opinio valoras. Venu al la Kongreso kaj kontribuu al la progreso de Esperanto.”

